# *Prezidis Raúl Castro ceremonion pro la sendependeco de Angolo*



Okaze de la 40-a datreveno de la sendependi?o de Angolo, okazis en la universala halo de la Revoluciaj Armitaj Fortoj de Kubo, speciala ceremonio, kiun prezidis Raúl Castro, prezidanto de la ?tata konsilantaro de la insulo.

Dum la ceremonio, la kuba ?tatestro transdonis la titolon de Heroo de la Kuba Respubliko kun postmorta karaktero kaj la ordeno Máximo Gómez je unua grado al familianoj de la batalantoj  Raúl Díaz kaj Víctor Schueg Colás, krom transdoni la unuan el tiuj distingoj al la ministro pri internaj aferoj, generalo de divizio, Carlos Fernández Gondín.

Aliflanke, la generalo de armea korpuso Alvaro López Miera, unua vicministro de la armeo, alparolis la ?eestantojn pri la heroa agado de la kubaj batalantoj en la milito de Angolo kaj ties determino ne cedi anta? la imperiisma altrudo.

Miera emfazis ke Kubo ne ser?is materian intereson en tiu sendependiga milito, nur la historian kompromison kun la afrika lando, kio ?is nun validas, kaj ekde aliaj flankoj restas aktuala en la medicina kunlaboro, edukaj inter?an?oj kaj aliaj.

Angolo sukcesis trarompi la koloniismajn ?enojn portugalajn la 11-an de novembro 1975, kiam la unua angola prezidento, Agostinho Neto, proklamis la sendependecon  en la Placo unua de majo, nuna Placo

de la Sendependeco.

Kubo kaj Angolo posedas historiajn ligojn, kiuj fratigas amba? naciojn kaj popolojn.

La ceremonio fini?is per kultura momento kun la prezento de kubaj artistoj kaj junaj amatoraj artistoj de la brigadoj de la armeo de Kubo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/75586-prezidis-raul-castro-ceremonion-pro-la-sendependeco-de-angolo

**Radio Habana Cuba**